## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj:

Kiel sekvo de nia lasta balotado por elekti niajn interkongresajn gvidorganojn, la konsisto de nia Plenum-Komitato renoviĝis per la eniro de tri novaj junaj fortoj: Saioa Escobar, Alexandra Paz kaj Brandon Sowers. Dankinda estas la laboro farita de la elirantaj PK-anoj, inter kiuj apartan mencion meritas Guy Cavalier, kiu dum 39 jaroj partoprenis la asocian vivon kiel PK-ano kaj plu partoprenos kiel ĝenerala konsilanto por la sideja urbo. En la sekva numero aperos detala raporto pri la rezulto de nia voĉdonado.

Alia ankaŭ tre grava renovigo okazas rilate al nia ret-paĝaro, kies informadika bazo ĵus ĝisdatiĝis danke al la laboro de aliaj junaj fortoj.

Ĉio ĉi donas al ni esperon en senespera ĝenerala socia kunteksto. Ja la tuta socio frontas nuntempe historiajn defiojn. Kaj en krizaj momentoj la rolo de nia asocio montriĝas aparte grava. Ni celas kapabligi aktivulojn per libera debato de ideoj kaj interŝanĝo de spertoj tiel, ke ili estu pretaj plej efike interveni en la evoluon de la socio. Hodiaŭ tiu celo akiras specialan, transcendan, signifon. Pripensu pri viaj kapabloj. Certe, ankaŭ vi povas fari ion utilan por nia asocio kaj por la socio. Faru paŝon antaŭen: verku artikolojn por nia revuo, eniru la reviziado-skipon, helpu prizorgi niajn retpaĝojn... Atendas vin helpo-pretaj kamaradoj.

Kiel kutime, ni esperas, ke la legado de la revuo estos inspir-dona kaj debat-veka.

La redakto-skipo

### Frontpaĝa bildo:

**Oŝioka Taeko** (meze) kolektis pli ol 100 000 subskribojn kontraŭ la nukleaj armiloj.

## Enhavo

Enhavo

**Tra la mondo: Afriko**

4 Pri akvo-problemoj en Goma

**Tra la mondo: Azio**

5 Oŝioka Taeko

**Tra la mondo: Eŭropo**

9 Malbonaj novaĵoj el Portugalio

**Tra la mondo: Mezoriento**

11 Turkio kondamnis je 27 jaroj da enkarcerigo la ĵurnaliston Dündar

11 Turkio kondamnis je 22 jaroj da enkarcerigo la PDP-eksdeputiton Leyla Guve

**Nekrologo**

13 Memore al Marija Prilepskaja

**Historio**

15 Josef Stalin kaj nia socialismo

17 Pri la historio de Senŝtatano

19 Vojo al infero

21 Anarkifeministinoj komence de la 20-a jarcento: *La Revista Blanca*

**Medio**

24 Proksima ĉiutaga planeda dieto

**Opinio**

27 Pri aksiologio

30 Longdaŭra historia tendenco aŭ la faŝismo 2.0

33 Panoramo de kadukiĝo

37 La "Americano"

**Sennaciista Frakcio**

38 Tasko: "imunigi … esperantistojn … kontraŭ la naciisma bacilo"

**Beletro**

39 Hispana somero

42 Komento al recenzo

**El la SAT-Administrejo**

43 Novaj aliĝoj

43 Donacintoj

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*

**SENNACIULO.REDAKTEJO@GMAIL.COM**

# Pri akvo-problemoj en Goma

**Delonge, mi korespondas kun mia amiko de Goma, Hubert Hakizumwami. Mi konatiĝis kun li okaze de la SAT-kongreso en Bulonjo ĉe Maro en 1987! Li estis lasinta anoncon pri korespondo-peto. Niaj rilatoj jam daŭras 33 jarojn! En tiu regiono, ne multo ŝanĝiĝis. La nacia registaro tre malmulte faras por la sano, la lernejoj, por bonteni vojojn! Sekve al la milito en Ruando kaj ties genocido en 1994, la tuta regiono plu suferas pro atakoj de diversaj milicanoj. La regiono estas riĉa je mineraloj, precipe je koltano – kio allogas ĉia-specajn rabemulojn, inkluzive mult-naciajn entreprenojn! Pro la malsekureco, multaj vilaĝanoj (ekz. la familio de mia amiko) rifuĝis en la ĉefa urbo de Kivu-o: Goma (jam pli ol unu miliono da loĝantoj!). La provizado de trinkebla akvo estas unu el la multaj malfacilaĵoj, kiujn devas alfronti la loĝantoj, kies kuraĝon ni povas admiri!**

**Jen, ĉi-sube, informo realigita de la gefiloj de Hubert.**

PIERRE GROLLEMUND (32319)

Goma estas urbo oriente de DR Kongo, ĝi estas la ĉefurbo de provinco Norda Kivuo. Ĝia surfacamplekso estas 66 324 $km^2$.

Goma enhavas almenaŭ 1 100 000 enloĝantojn. Pro la ĉiutagaj militoj en la komunumoj kiuj ĉirkaŭas la urbon Goma, multaj personoj migras al Goma. France, ni parolas pri "Exode Rural". Homoj sin rifuĝas al Goma pro manko de sekureco en siaj vilaĝoj. En tiu urbo homoj vivas en malfacilaj vivkondiĉoj, la sanaj kondiĉoj ne estas respektitaj precipe en popularaj kvartaloj. La plej granda malhelpo al kiu sin frontas la loĝantaro en Goma estas manko de pura akvo en la tuta urbo malgraŭ la najbareco kun la lago Kivuo. Pli ol tri kvaronoj de la loĝantaro ĉerpas akvon el la lago. Pro la malfacila aliro al pura akvo, ĉiu enloĝanto estas devigata uzi tiun akvon de la lago Kivuo, kiu estas malbonkvalita kaj estas la fonto de multnombraj malsanoj kiel lakso, ĥolero, tifoid-febro, ĉiuspecaj intestaj vermoj..., ĉar tiu akvo ne estas bonkvalita, kaj niaj registaroj ne pensas pri la bonfarto de sia loĝantaro. Sen desinfekti tiun akvon, la loĝantaro uzas ĝin por siaj malsamaj familiaj bezonoj.

Por ĉerpi tiun akvon, oni uzas sitelojn, ladbotelojn... kaj nur virinoj kaj infanoj ankoraŭfoje multe suferas por provizi akvon al siaj familioj. Ili devas marŝadi multajn kilometrojn al la lago por havi nur 20 litrojn da nebonkvalita akvo.

Aliaj malhelpoj por tiu akvo en Goma estas, ke ni ĉeestas oftan dronadon de infanoj kiuj iras ĉerpi akvon el la lago.

Alia malhelpo estas la ĉiutagaj seksperfortoj kontraŭ virinoj ĉar ili leviĝas frue matene aŭ iras malfrue vespere por trovi akvon. Bedaŭrinde Goma estas plena de banditoj kiuj dumnokte atakas tiujn malfeliĉajn virinoj kiuj serĉas akvon. Vere, pro akvo virinoj en urbo Goma multe suferas.

Nur kelkaj personoj kiuj havas eblecojn aĉetas akvojn de malmultaj cisternaj kamionoj kiuj vendas purajn akvojn ĉar oni desinfektas tiun akvon antaŭ vendi ĝin.

Kial oni ne trovas akvon per tuboj, kanalizacioj kaj kranoj en la urbo Goma? Tio estas bona demando. Goma estas vulkana urbo kaj la plej ĵusa vulkana erupcio de Nyiragongo kaj Nyamulagira okazis je 2002. La tuta urbo Goma estas kovrita de lafo. Pro tio, fari kanalizaciojn multe kostas. Nur neregistaraj organizoj



Goma kaj Nyiragongo



Goma kaj Nyiragongo nokte



Ĉerpante akvon el la lago Kivuo



Akvo-portado

(NRO-j) provas fari ion por provizi puran akvon al la loĝantaro por protekti la loĝantaro kontraŭ danĝeraj malsanoj kiel ĥolero, ebolo kaj nun, la kronviruso. Ĉiuj scias ke sen regule lavi la manojn kronviruso rapide kaj facile sin transdonas de unu al alia. La registaroj neniam pensas provizi puran akvon al sia loĝantaro malgraŭ ke ili bone scias, ke akvo estas la vivo.

Senigi homon de pura akvo estas morta peko kaj tio estas kontraŭ la homaj rajtoj. Ni juristoj tion kondamnas.

Elvis kaj Nataŝa HAKIZUMWAMI

## Tra la mondo: Azio

# Oŝioka Taeko

### Esperantistino, kiu sola kolektis pli ol 100 000 subskribojn kontraŭ la nukleaj armiloj

## Artikolo pri s-ino Oŝioka Taeko

La 27an de septembro 2020 en la ĵurnalo *Asahi* kaj la 16an de novembro en la ĵurnalo *Tokio* aperis grandaj artikoloj pri s-ino Oŝioka Taeko loĝanta en la urbo Hiroŝima. Ambaŭ artikoloj estas similaj. Jen traduko de la artikolo aperinta en la ĵurnalo *Tokio*.

**Por abolo de nukleaj armiloj eksa instruistino sola kolektis 109 mil voĉojn antaŭ la Atombombita Domo**

109 000. Tiu estas la nombro de la subskriboj, kiujn s-ino Oŝioka Taeko, eksa instruistino 71-jara, sola kolektis dum la pasintaj kvar jaroj.

La 24an de oktobro Honduro anoncis al la Unuiĝintaj Nacioj, ke ĝi ratifis la Traktaton pri Abolo de Nukleaj Armiloj. Tiu ĉi traktato estis adoptita de 122 landoj en la UN en julio 2017 kaj en tiu tago ĝi gajnis la ratifon de 50 landoj en la mondo por ekfunkcii. Okaze de tiu ĝojiga novaĵo, oni decidis daŭrigi kolektadon de subskriboj ĝis la fino de 2020. S-ino Oŝioka staradas antaŭ la Atombombita Kupolo, dirante, "Danke al la Traktato mi povas pli pozitive kaj fiere kolekti subskribojn".